

& Stranga nostalgio:

< Rekante 20 el 29 batoj por strofo, entute 406 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Julio Baghy (Preter la vivo, Budapest 1923). Baladigis Martin Strid (2017) per islandaj melodio kaj rekantaĵo de Olav Rajdistrozo.>

(#Melodio:

(#: <:29> o;so /soso doososo sola so; mifa so mire do;so soososo soorelmi fami doo;mifa soso sofa milso; soso lalalaa sofa mire do dore; mire mimifaa soso lafa mi re do)

)×14)+

(&Strofoj:

,&1:

'1 Sur /vastaj stepoj de Siberi'

(×:; **Se erar', li en star'** ;)

vagadi, eĉ nun, mi 2n vidas mi.

(×:; **Kaj la ruĝa brulis fla2m'. ; Milde ŝarĝon li metis sub la montkruto ; milde ŝarĝon li metis sub la monta krut'.**)

'2 La kant' de l' vintro muĝas nur en ventsiblado kun murmur'... ..

'3 Rakontas ĝi pri larm', sufer', pri detruitaj rev', esper',

'4 pri krimoj de l' militkruel' kaj sangaj tagoj de l' ribel'... ..

'5 Veadas en ĝi: kri' de l' mort', ĉielon blasfemanta vort'

'6 kaj ploras en ĝi kun sopir' infanojn orfiĝanta spir'... ..

'7 Ho Dio, tamen je Siberi', min kial premas la nostalgi'?!

,&2:

'8 En ligna domo de Siberi', ĉe forno sidi, min vidas mi.

'9 La griloj ĉirpas en trabar', intime zumas samovar'... ..

'10 Fabelas ili en silent' plej belajn songojn de korsent'

'11 Nun min kulpigas en sekret', ke restis tie knabinet',

'12 ke forlasitaj, jen, anim' kaj koro, kiuj amas min,

'13 ke restis tie eĉ mi mem kaj venis hejmen - viva ĝem'!... ..

'14 Pro tio sole je Siberi' min premas larme la nostalgi'!